Zhāng Jiŭ Líng,

## La akvofalo

*tradukita de Xiong Linping*

De alto de dek-mil futoj,
kvazaŭ de la ĉielo
la kaskado fluge ĵetas sin suben,
kaj ĉirkaŭ ĝi prezentiĝas
nimbo jen ruĝa jen purpura.
Ĝi, ŝajnante esti ĉielarko sub la suno,
rekte falas inter arboj kaj tra la nebulo;
en la serena vetero aŭdeblas
bruo de vento kaj pluvo.
Kiel majestas la monto Lushan!
La nebulo kaj la akvo harmonie
kunfandiĝas en fean iluminacion.

*Traduko de la ĉina poemo "Hú kǒu wàng lú shān pù bù shuĭ" de Zhāng Jiŭ Líng en Esperanton de Xiong Linping.*

*Arg-987-1991 (2014-04-03 10:44:09)*

Zhāng Jiŭ Líng,

## La akvofalo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Blinde sin ĵetas purpur' akvofala
en la abismon tie ĉi.
Kaj disiĝas la ruĝo kaj pala
akvofumo eliĝas el ĝi.
De l' altej' nebulvualo
subeniĝas tie ĉi,
ĝi ruliĝas tra la valo,
de la arboj gutas ĝi.
Glime sur la ŝaŭm' ŝvebanta
estas arko el odor'
kaj la akvo estas bruanta
kvazaŭ tondro en la for'.
El la verdo de l' arbaro
rokoj supren levas sin.
La prafort' de l' vivantaro
bolas jen en la ravin'.

*Traduko de la ĉina poemo "Hú kǒu wàng lú shān pù bù shuĭ" de Zhāng Jiŭ Líng en Esperanton de* MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04) en 2013-12.*

*Arg-987-1993 (2014-04-07 16:42:27)*

Zhāng Jiŭ Líng,

## Hú kǒu wàng lú shān pù bù shuĭ

Wàn zhàng hóng quán luò
tiáo tiáo bàn zĭ fēn
bēn liú xià zá shù
să luò chū chóng yún
rì zhào hóng ní sì
tiān qīng fēng yŭ wén
líng shān duō xiù sè
kōng shuĭ gòng yīn yūn

*Verkinto de tiu ĉi ĉina poemo estas Zhāng Jiŭ Líng.*

*Arg-987-1990 (2014-04-04 19:34:22)*

*Pri la poeto vidu la retejon* `http://ja.wikipedia.org/wiki/eëᶍ∂eƗŭ„ђ` *respektive* `http://en.wikipedia.org/wiki/Zhang_Jiuling`*. La titolo signifas: "De Hukou mi rigardas la akvofalon de la monto Lushan".*